

PERMAKULTIVADO (foto 1)

Ĉu la taŭga vorto estas permakulturo aŭ permakultivado ? Se oni pensas pri la kultura aspekto, oni diras permakultivadon, sed fakte, la temo estas multe pli vasta, do la vorto permakulturo ankaŭ taŭgas.

I. DIFINO. (foto 2)

La permakultivada koncepto, bazita sur observo kaj ripetiĝo de la naturaj ekosistemoj, celas interkonektigi plurajn elementojn de la sistemo, por krei daŭrajn kaj paciĝintajn mediojn por ĉiuj vivantaj estaĵoj (« permanenta » estas sinonimo de « daŭra » : permanenta kultivado iĝas « permakultivado »)

Permakultivado entenas du distinktajn temojn :

- 1) la unuan, pli filozofian, priskribas novan vivmanieron, en harmonio kun la naturo kaj inter la homoj.
- 2) la duan, pli pragmatan, montras kiel krei daŭrajn vivlokojn, agrikulturajn entreprenojn, por individuoj aŭ socioj.

Antaŭ kelkaj jaroj, mi eksciis pri permakultivado. Legante librojn, sekvante staĝojn, mi konstatis ke, fakte, mi praktikis permakultivado ekde pluraj jaroj sen konscii pri ĝi. Ĉiuj fotoj kiuj ilustras tiun prelegon estas fotitaj ĉe mi, ĉirkaŭ mia domo.

II. DEVENO. (foto 3)

En 1970, du aŭstraliaj ekologistoj, Bill Mollison kaj David Holmgren, serĉis ideojn por krei daŭrajn agrikulturajn sistemojn, respondante al la rapida progreso de la polucio en sia lando.

Ili inspiriĝis de freŝdata metodo de japano Masanobu Fukuoka, kiu skribis libron : « Revolucio de nura pajlero ». Permakultivado estas do renkontiĝo inter orienta vasta vizio kaj okcidenta kartezia vidmaniero.

En la 1980aj jaroj, la koncepto evoluis, kaj de agrikultura sistemo, ĝi pasis al kreado de daŭraj homaj socioj.

Nun, permakultivado estas monde aprobita, dank'al nombraj konkretaj projektoj, lokaj kaj naciaj asocioj, ĉu en okcidentaj landoj, ĉu en sudaj landoj.

III. LA ETIKO. (foto 4)

En la koro de permakultivado, oni trovas tri fundamentajn valorojn :

- zorgi pri la Tero
- zorgi pri la Homoj
- dispartigi egale la riĉofontojn kaj krei abundecon.

IV. LA PRINCIPOJ. (foto 5)

- 1) Ĉiu elemento devas plenumi plurajn funkciojn. Ekzemple : marĉeto estas utila por rikolti kaj rezervi akvon, faciligi biodiversecon, produkti kanojn por pajlokovrado, reflekti la sunlumon, ktp.
- 2) Ĉiu funkcio estas plenigita de pluraj elementoj. Ekzemple : suna hejtilo estos kupligita de ligna hejtilo. (foto 6)
- 3) Cirkulado de energio. Ekzemple : Akvo kaj nutraĵoj estos produktitaj rekte sur la bieno, por konservi ĝian fertilecon. (foto 7, tranĉita herbo, pajlo, velkaj folioj)
- 4) Plurkultivado kaj diverseco de la specioj (foto 8 kokcinelo kaj mespilo)
- 5) Rando-efekto. Zorgu pri la randoj de la bieno, ĉar ili posedas pliajn kaj apartajn partikularojn.(foto 9, juna heĝo)

V. LA PERMAKULTURA FLORO.(foto 10)

Mi elektas kelkajn vortojn en tiu listo, kaj mi konstatas ke mia vivmaniero kongruas kun tiuj kriterioj.

- Purigo de uzitaj akvoj per plantoj (foto 11)
- Reciklado, akvo kaj rubaĵoj (foto 12)
- Medicino per kuracaj plantoj (foto 13) Tanaceto aŭ vermoherbo
- WWOOF (foto 14). Tutmonda Asocio en Organikaj Farmoj.
- Kunloĝado (foto 15, avec Maëlle)
- Organika agrikulturo (foto 16)

VI. DIVIDO DE LA BIENO (mapo 17)

Nia bieno estas granda je 2 kaj duono hektaroj.

Antaŭ ol krei nian permakulturan ĝardenon, ni devas cerbumi pri lokalizado de ĉiu elemento : kiuj estas la mikroklimatoj de la bieno, la zonoj kiuj ricevas froston, sunon, ĉefajn ventojn ?

Kiuj partoj oni vizitas plej ofte ?

La divido de la bieno estas bazita sur la frekvenco de la uzoj, la frekvenco de la movoj inter la zonoj kaj la pasinta tempo en ĉiu zono.

Zono 0 : la domo (foto 18)

1 : la ĝardeno kaj la elementoj kiuj postulas ĉiutagan atenton :

Legomĝardeno (foto 19) kaj la metiejo (foto 20)

2 : la fruktarbaro (fotoj pomoj kaj beroj 21 kaj 22), la ligno-provizo (foto 23)

3 : pli malproksime, la paŝtejoj (foto 24), la marĉeto, la heĝoj (jam viditaj)

4 : la arbaro (foto 25), malantaŭ la paŝtejo.

5 : ankoraŭ pli fore, la sovaĝa spaco, por promenado, meditado, observo de la sovaĝa naturo.

Estetiko estas grava punkto en Permakulturo (foto 26) : oni kultivas en cirkloj, spiraloj, laŭ la alteco (foto 27), kun paliseto (foto 28), oni miksas legomojn kaj florojn (foto 29).

VII. KONKRETAJ PRINCIPOJ EN LA ĜARDENO (foto 30)

1) La tero estas kovrita, ne ŝpatita.

La kovrado estas grava : tranĉitaj branĉetoj (BRF) (foto 31 : alteo), pajlo kovrado aŭ verda sterkaĵo (foto 32), vegetalaj forĵetaĵoj : ĝi konservas samtempe humidecon kaj fertilecon de la tero, kaj bremsas la aperon de la neakceptindaj herboj.

La kultivado okazas plej ofte sur talusoj (foto 33), kiuj kumulas plurajn avantaĝojn : komforton por la ĝardenisto, pli densajn kreskaĵojn, pli fruajn rikoltojn ĉar la grundo hejtiĝas pli rapide.

Konstruado de ĝarden-taluso :

Foto 34 : fabrikado : oni fosas truon por meti branĉetojn, jen oni kovras per komposto, jen per tero, kaj finfine per pajlo.

Foto 35 : kun legomoj

Konstruado de pajlaj bedoj, kiu estas alia tekniko pli kaj pli uzita, ĉar tre facila kaj efika kiam la grundo estas infestita de nedezirindaj herboj.

36 : Preparado : oni unue kuŝas kartonojn sur la grundo, poste komposton, poste pajlo, kaj oni daŭre akvumas.

37 : Unuaj rikoltoj.

2) La **plantaĝoj estas kunligitaj**, por profiti de iliaj bonefikaj interagoj. Oni inspiriĝas de la etaĝa strukturo de arbaro (desegno 38): sub altaj fruktarboj estas plantitaj arboj kiuj produktas berojn, jen legomoj kaj aromaj herboj kiuj akceptas ombbron. Tiuj aromaj herboj, krom provizi rikolton, celas riteni aŭ forpeli insektojn.

Foto 39 : aromaj herboj sub arboj.

3) La **plurjaraj plantoj estas privilegiitaj**, ĉar ili postulas malpli da laboro ol la jaraj plantoj.

4) **Marĉeto kaj heĝoj tre gravas**. Mi jam parolis pri la avantaĝoj de marĉeto. La heĝo (foto 40) siaflanke favoras diversecon de specioj, kontraŭas fortajn ventojn, ritenas akvon kaj humidecon, produktas lignon kaj fruktojn.

5) La **bestoj havas precipan rolon** : ĉe mi, la ŝafoj (foto 41) produktas lanon kaj viandon, senherbigas la terenon, kaj donacas sterkon. Foto 42 : la abeloj produktas mielon, sed ankaŭ plibonigas la polenadon de la vegetaĵoj. Mi ankaŭ partoprenas en agoj kiel « rifuĝo por la birdoj » (foto 43. rubekolo) kaj « observejo por la papilioj » (foto 44. malgranda testudo)

6) La **sovaĝaj manĝeblaj herboj** (ajlo de la ursoj (foto 45), okzalo, leontodo...) plenumas rikolton sen laboro.

VIII. KONKLUDO (foto 46)

Tiuj praktikoj estas bone konataj de ĉiu organika ĝardenisto. Mi certas ke Jonathan Chabert, dum sia prelego dimanĉon, jam prezentis al vi parton de tiuj principoj. La plej grava kontribuado de permakulturo estas ĝia kohero, ĝia globala penso. Inspirita de la naturo, permakulturo iĝas vivmaniero. Por la plej bono de la planedo kaj de la homoj.

IX. DOKUMENTOJ KAJ INTERRETAJ LIGILOJ (en la franca)

Pour débiter :

« *Jardiner autrement, la permaculture conseils et principes de base* », de Margit Rusch, Editions Ouest-France, mars 2011.

« *Graines de permaculture* » de Patrick Whitefield, Editions Passerelle Eco, 2009.

« *Premiers pas en permaculture : 50 projets et solutions pour le jardin et la maison* », de Ross et Jenny Mars, Editions Passerelle Eco, 2012

« *Introduction à la permaculture* », de Bill Mollison, Editions Passerelle Eco, 2012

DVD :

« *Guide du nouveau jardinage* », Dominique Soltner. 2 DVD. Site Agrovideo.

“ *Culture de la terre en synergie*”, Emilia Hazelip.

You Tube :

Videos de Philippe Forrer

Sites internet :

www.permaculture.fr

asso.permaculture.fr (Association Brin de Paille)

aupetitcolibri.free.fr (Association Imagine un Colibri et la ferme expérimentale de Richard Wallner).